

Boulogne sur Mer
31, Boulevard Mariette

la 20^{an} de Marto 1924

1

Mia kara Amiko,

Grandan ĝojon mi havis hodiaŭ matene, legante vian P.K. vidante la konatan manskribon tiel maloftan nuntempe.

Ofte mi al vi skribis mense sed, fakte, neniam faris tion por ne ĝeni vin. Ĉar vi estus sentinta vin eble devigita respondi.

Kiel vi pasigis la teruran vitron? mi esperas ke vi tute ne estis malsanaj. Ĉe ni dum la malvarmo ni estis bone, sed poste kiam okazis la degelado + pli varma vetero, mi havis la "gripon". Dum Dec + Jan. mi ankaŭ estis malsana (interne).

Ni spertis alian malagrablaĵon: oni ŝtelis al ni ĉirkaŭ 10 000 frankojn en 5 aŭ 6 foje. Oni ŝtelis la ŝlosilon + eniris la domon dum ni estis for 4 dimanĉojn, + 2 fojojn dum ni dormis. Ni metigis novan ŝlosujon sed homo atakis nian servistinon + al ŝi ŝtelis la saketon kie estis nia nova ŝlosilo. Ŝi pensis rekoni serviston kiu mi havis la lastan jaron. Ŝi iris al la polico kiu arestis lin + fine post 3 semajnoj en malliberejo li konfesis ke estis li. Antaŭe, li ĉiam neis ĉion. Nun li estas kondemnita² al 1 jaro de malliberejo. Li estis juĝita ĉe la Tribunalo por infanoj ĉar li nur estos 18 jara la proksiman monaton.

Li, pri ĉio, estas terura individuo. Tute tute ne interesa pro ĉiama mensogado. Kompreneble, ni neniam rehavos nian monon. Malfeliĉe, en Dec, oni suspektis alian "tagan" servistinon kiu forlasis Boulognon + ŝi estis vizitita de la policaro. Kaj ĉio estis en la gazetoj!

Mia koro estas malĝoja ĉar oni ĵus anoncis ĉe la Radio la morton de Marŝalo Foch - tiu fama homo fine forlasis nin!

Ĉu vi havas fine radian aparaton + se jes, kion vi kutime aŭskultas? Mi kutime prenas Parizon, Daventree, Berlinon, Toulouse, Hilversum, Kopenhagon + ĉiujn germanajn radiostaciojn. Prahon mi malbone ricevas - tamen kelkafoje mi aŭdas ĝin.

Mi serĉas novan interesan korespondanton. Mi skribis al rekomendita italo en Brescia, antaŭ 5 tagoj, sed li ne ankoraŭ respondis.

Miaj polaj korespondantoj vere tro malofte skribas, ĉiuj 3 aŭ 4 monatoj. S^{ro} Guerra (Meksiko) kompreneble ĉiam skribas.

Sed estas malfacile trovi iun kiu estas interesa + kiu mem estas interesigita pri francaj okazintaĵoj + pri mi mem. Ĉu mi trovos? La estonteco tion montros. Kutime ili ĉiam volas skribi por flirti kun fraŭllinoj + ne pro la intereso de la leteroj.

Unu Esp. ĉe la Antverpena Kongreso deziris korespondi kun mi + post kelkaj leteroj, li parolis pri obscenaĵoj + petis ke mi al li sendu obscenajn bildojn por amiko rusa lia kiu kolektas similajn dokumentojn por libro kontraŭ la prostitucio!!! vi povas diveni mian respondon. Li petis pardonon, poste. Ĉu vi povus kredi trovi tion ĉe Esperantisto?

¹ manskribita noto: "zodp. 28/3 29"

² ĉu "kondamnita" ?

Via P.K. estis tre bela + mi dankas al ĉiuj kiuj subskribis. Mi nur konas Kamaryt. Kie mi estus ŝatinta esti kun vi ĉiuj + babiladi kun vi kiel en pasitaj³ tagoj.

Kiel estas via nuna animstato? mi tiel ŝatus scii, sed sendube vi ne rakontos tion.

Mi ofte revivas la Kongresajn tagojn + tiel bedaŭras ke vi ne trovis nin en Bruselo. Mi ne iros al Buda Pest.

Atendante, eble, eble, iam, respondon kiu faras ĝojon al mi, mi al vi premas la manojn salutante vin tute amik'maniere.

Alice Sergeant

³ ĉu "pasintaj" ?